Pasie pri lingvoj!

Bruselo (Belgujo), 08.12.2014

# GeoLingvo – ludu, dividu kaj lernu

*La nova interaga prilingva retejo "Lingvo.info" ĵus lanĉiĝis en Eŭropo. La retejo baldaŭ estos unu el la plej novigaj kaj amuzaj retaj iloj por subteni multlingvismon en la Interreto. Ĝi celas oferti informojn pri ĉiaj lingvorilataj temoj kaj instigi la uzantojn lerni lingvojn.*

Krom pli klasikaj manieroj prezenti informojn pri lingvoj, kiuj estas efektivigitaj en alloga kaj plaĉa maniero, la projekto uzas ankaŭ sociajn retojn kaj interagajn ludojn por veki intereson ĉe la lernantoj. Laŭ la projektestro Maja Tišljar, tiuj iloj estas aparte allogaj por juna publiko.

"Lingvo.info ne nur prezentos interesajn informojn. Ni ankaŭ volas, ke junuloj enamiĝu al lingvoj, kaj instigi ilin malkovri la diversecon de la eŭropa lingva mondo. Kiu maniero atingi junulojn estas pli bona ol interagaj ludoj kaj sociaj retoj? La Lingvo.info-ludo GeoLingvo povas esti ludata rekte en Facebook, do tio igas tre facila kaj oportuna la komencon de vojaĝo al la mondo de lingvoj. GeoLingvo estas strategia ludo inspirita de la populara ludo Risko: la ludantoj devas konkeri diversajn landojn respondante demandojn pri ties lingvoj kaj kulturoj. Ni pasigis multajn horojn ludante tiun ludon, konkurante unu kontraŭ la aliaj kaj provante eltrovi, kiu en nia teamo estas la plej bona lingvofakulo", ridas la projektestro.

Lingvo.info estas financata de la Eŭropa komisiono kaj unuigas 9 partnerojn el 7 landoj. La partneroj laborintaj pri la projekto ĉiuj havas ampleksan sperton pri diversaj lingvaj kaj lingvorilataj agadoj en siaj landoj: Germanio, Belgio, Slovakio, Pollando, Danio, Slovenio kaj Litovio.

Lingvo.info estas atingebla tie: http://lingvo.info
Eblas sekvi la projekton tie: https://www.facebook.com/lingvo.info

La projekto lingvo.info celas provizi informojn pri lingvoj kaj subteni multlingvismon en la Interreto. La fina rezulto de la projekto estas la multlingva retejo lingvo.info. Ĝi estas noviga, interaga kaj interesa reta ilo por instigi eŭropanojn lerni lingvojn, provizi utilajn materialojn al instruistoj, konigi ekzistantajn retajn kursojn kaj montri, kiel interesaj kaj amuzaj povas esti lingvoj.

La projekto lingvo.info estas financata per subteno de la Eŭropa komisiono laŭ la Programo por Dumviva Lernado.

**Kontaktoj:**

Euŭropa Esperanto-Unio (EEU)
Maja Tiŝljar
Projektkunordiganto
press@lingvo.info

Interlingvistikaj Studoj UAM
Ilona Koutny
projektkunordiganto de la pola flanko
ikoutny@amu.edu.pl

Lifelong Learning Programme

Tiu ĉi projekto estas financata per subteno de Eŭropa Komisiono. Tiu ĉi publikaĵo respegulas nur vidpunkton de la aŭtoro, pro tio la Komisiono ne povas esti respondeca pri ajna uzado de informoj, kiuj aperas ĉi tie.